# esperanto aktuala

Revuo de la **E**sperantista **B**rusela **G**rupo Numero 6 / 2015







Proponu al viaj konatuloj (amikoj, kolegoj, kuzinoj, najbajroj, ktp...) aventurojn por junuloj de la 11 ĝis la 17-jaraĝa ĉe la Verdaj Skoltoj !





Ĉar jes ! Eblas lerni Esperanton nur per ... praktikado en Esperanto-skolta atmosfero !

Ne hezitu, reklamu kaj disdonu informojn pri la Verdaj Skoltoj !

Ĉiam ni havas sunon ... almenaŭ enkore !!!
www.verdajskoltoj.net





NI KRESKAS
verdaj skoltoj

# K O L O F O N O

40a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : aktuala@esperantobruselo.org ;
Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. **Aktuala estas libere elŝutebla tie** : https://sites.google.com/site/ebgaktuala/
**Prezidanto** : JM Nicolas de BUYL : prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com
**Sekretario** : Laurent Loisse sekretario@esperantobruselo.org , **Informoj / kursoj :** Françoise Pellegrin fransuaz@esperantobruselo.org
**Eventoj :** JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org **Retejo de EBG : www.esperantobruselo.org**
**Abona membriĝo** : 12 aŭ 18 eŭroj jare, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo
**Kunvenejoj** : 1° ĉe **«De Pianofabriek» (DPf)** : Rue du Fort-straat 35, en 1060 Bruselo, Metroo : Parvis de St-Gilles/St-Gillis Voorplein
2° ĉe la **Eŭropa Komisiono (EK)** : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo - Metroo Maelbeek/Maalbeek



# A G E N D O

*Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur nia nova retejo : www.esperantobruselo.org*

**Kursoj kaj kunveno okazas ĉiumerkrede ekde la 16a de Septembro,** en nia **nova** kunvenejo:
**De Pianofabriek**, 35 rue du **Fort**straat, 1060 Bruselo.
Novuloj, bonvolu sin anonci al fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28

**EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron,**
**bonvolu kontakti nikolao@esperantobruselo.org aŭ vespere 0478 382 981**

## NOVEMBRO

| | | |
|---|---|---|
| **Merkredo la 4a** | **18:30 - 20:00 (EK)** | **ĜENERALA ASEMBLEO de EBG ! ĉe la EK !** **Efektivaj membroj kaj estraranoj tre insiste - petataj ĉeesti.** |
| **Sabato la 7a** | **14:00 - 16:00** | **Konversacia rondo en Dilbeek** Lydia Buyst : 054 33 01 51 |
| **Lundo la 9a** | **19:00 - 22:00** | **Babilemaj Spagetoj** aliĝo surrete aŭ mlaitat@yahoo.fr **Garden City,** Place de la Liberté 6, 1000 Bruselo |
| **Merkredo la 11** | **18:30 - 20:00 (EK)** | **Babilronda kunveno ! ĉe la Eŭropa Komisiono !** (VM2) |
| **Merkredo la 18** | **18:30 - 20:00 (DPf)** | **Prelego :** de Angelos Tsirimokos pri **Greklando baraktanta en financa krizo** |
| **Sabato la 28a** | **17:30-22:00** | **Esperanto Kafejo** (konfirmenda) **La Belladone** Rue Moris 17 - 1050 Ixelles |

## DECEMBRO

| | | |
|---|---|---|
| **Merkredo la 2a** | **18:30 - 20:00 (DPf)** | **Prelego :** de Bernard-Reĝis Larue pri **esplorado de Cereso kaj Plutono** |
| **Sabato la 12a** | **12:00 - 18:00** | **Zam' FESTO de EBG ! ĉe « De Pianofabriek » !** |
| **Lundo la 14a** | **19:00 - 22:00** | **Babilemaj Spagetoj** aliĝo surrete aŭ mlaitat@yahoo.fr **Garden City,** Place de la Liberté 6, 1000 Bruselo |
| **Merkredo la 16** | **18:30 - 20:00 (DPf)** | **Kantateliero :** (konfirmenda) |
| **De Dim. la 27a ĝis Dim. la 3a/01** | | **Novjara Renkontiĝo (NR) -> por mirindaj renkontoj!** |
| **De Dim. la 27a ĝis Dim. la 3a/01** | | **Junulara E-Semajno (JES) -> Mojose !!!** |

## JANUARO

| | | |
|---|---|---|
| **Sabato la 7a** | **14:00 - 16:00** | **Konversacia rondo en Dilbeek** Lydia Buyst : 054 33 01 51 |

**Saluton Kara Legantaro !**




Unue, ni elkore gratulas la gajninton de la Kanto-Konk'Urson en Hamburg' (Germanio) lastmonate: **Jonny M** (surfote dekstren) !

Ĉu vi jam vizitis nian novan renkontiĝejon «De Pianofabriek»? Lasttempe, en la enirejo kie staras surmure la diversaj agadoj, estis familio. La plej juna knabino diris al sia patrino: «Rigardu!  La klaso de Esperanto aspektas tre amuza !»
Prave, dank'al Fransuaz kaj Nikolao kiuj kutimas gvidi la 2 klasojn, ĝi estas, certe !
Ankaŭ, ni invitas vin partopreni nian feston la 12an de Decembro (paĝo 24). Vi malkovros taŭgan belegan festejon por rekonti amikojn, babili, spekti, ridi, ...

Alia afero: ni bezonas reklami por ankoraŭ diskonigi la Verdajn Skoltojn. Kaj nia plejbona reklamado, ... estas vi mem !
Vi havas jam informojn paĝo 2. Eku !

Laste, sed ne balaste ...Estas kroma artikolo pri la Uninersala Kongreso lastsomere en Lillo.

Jes, ŝajnas ankoraŭ ke tiu eventego paroligas ankoraŭ: Ĉu vi ĉeestis ? Jes ? Ne ? Bone, dank'al nia plejŝatata regula raportisto, Liba, vi legos tuj iom pli por plidiskuti !

*Viaj redaktoroj*
aktuala@esperantobruselo.org




## Enhavo


| | |
|---|---|
| Paĝo 2 : | Verdaj Skoltoj |
| Paĝo 3 : | Kolofono kaj Agendo |
| Paĝo 4 : | Edito kaj Enhavo |
| Paĝo 5 - 8 : | AMO 2016 en Nepalo |
| Paĝo 9 - 10 : | Chuck Smith Muzaiko |
| Paĝo 11 - 14 : | La kasteleto de nenie |
| Paĝo 15 : | Lupo kaj Ŝafido |
| Paĝo 16 : | Cirilo kaj Roz' |
| Paĝo 17 - 18 : | La 100a UK |
| Paĝo 19 : | Fotoj de la UK |
| Paĝo 20 - 21 : | Ekologio (Diplo) |
| Paĝo 22 - 23: | IJK 2015 |
| Paĝo 24 : | Zam'Festo 2015 |

# Dua Speciala Ekskurso, 2016 kun AMO Seminario de UEA, en Nepalo



La Nepala Esperanto-Asocio anoncas 12-tagan specialan ekskurson kaj AMO seminarion ekde la 26a de februaro ĝis la 8a de marto 2016. Ĉiuj scias ke NEspA okazigas la Himalajan Renkontiĝon , ĉiu dua jaro (ĉi-jare ni okazigis la 11an). La Himalaja Renkontiĝo signifas plejparte piedvagadon en la montaro, sed tio ne taŭgas al ĉiuj aĝgrupoj. Multaj samideanoj volas viziti Nepalon, sed timas tian marŝadon. Jen jam dua foje ni okazigos do ekskurson al famaj nepalaj turismaj lokoj, atingeblaj per buso kaj situantaj piede de belaj pejzaĝoj, inkluzive la famaj montaro videblaj en Katmanduo, Ĉitaŭan Nacia Parko, Nagrakot, Dulikhel kaj Pokhara. La nepala Esperanto-movado kreskas pli kaj pli, sed se ne ĉiuj anoj de NEspA povas viziti eksterajn landojn- pro la kosto-, almenaŭ eblas inviti amikojn el aliaj landoj tien ĉi. Kaj tio montriĝis fakte efika programo. La ĉefa celo de la programo estas konigi Nepalon kaj nepalajn esperantistojn al la mondo kaj reciproke; ĉi foje ni kunorganizos AMO seminarion de UEA kaj esperas ke la programo estos pli efika kaj signifoplena.

Nepalo estas ebriiga miksaĵo: fascina lando de antikva historio, viglaj kulturoj kaj popoloj, biodiverseco kaj majestaj pejzaĝoj.
Ĝiaj geografiaĵoj etendiĝas de belaj altaj neĝpintoj en la nordo, al malpli altaj montoj en la mezo kaj al bela, fekunda ebenaĵo kun multaj arbaroj en la sudo.
Situante inter Tibeto (Ĉinio) kaj la Ganga ebenaĵo (Barato), Nepalo, tra sia historio sentis la influon de ambaŭ tre diversaj civilizacioj, sed samtempe kreis identecon por si mem.
La lando havas preskaŭ 28 milionojn da homoj, parolantaj 125 lingvojn aŭ dialektojn.

Okdek procentoj de la nepala popolo sekvas hinduismon, sed la lando estas oficiale sekulara, kaj fakte, lando de multaj religioj.
La templo de Paŝupatinath en Katmanduo estas unu el la kvar plej gravaj lokoj por adorantoj de Ŝiva. La Budho, la "Lumo de Azio," naskiĝis en Lumbini, kiu situas en la suda ebenaĵo, farante de Nepalon la sanktan celon por pilgrimantoj. La multaj etnoj ofte kultas proprajn diojn.
Kvar lokoj de Nepalo estas agnoskitaj de UNESCO kiel mondheredaĵoj. En la unua, la valo de Katmanduo, reliefiĝas la urbo de Bhaktapuro, la reĝaj placoj de Katmanduo kaj Patano, la stupaoj de Svajam-bunath kaj Baŭdhnath, kaj la temploj de Paŝupatinath kaj Ĉangu Narajan.
Dua kultura heredaĵo estas Lumbini.
Plie estas la naturaj zonoj Everest Nacia Parko (1.148 km2) kaj Reĝa Ĉitaŭan Nacia Parko (932 km2), kiun ni vizitos dum la ekskurso.



## Historio

Dum sia historio de kelkmil jaroj, Nepalo travivis diversajn reĝajn dinastiojn. La plej antikva estis la Kiratoj, kiuj regis de la 9a jarcento a.K. ĝis la 1a jarcento p.K. Laŭ legendoj menciitaj de kronistoj, la Budho vizitis Katmanduon en la sepa reĝado de la sekva dinastio, la Liĉavioj, kaj la imperiestro Aŝoka venis al la valo kaj konstruis kvin stupaojn en kaj ĉirkaŭ Patano. Dank' al tre granda surskribita ŝtona kolono konstruita tie, oni scias ke Aŝoka vizitis ankaŭ Lumbinin. La Liĉavioj regis de siaj palacoj en

Katmanduo de la 1a ĝis la 9a jarcento p.K. Neniu el tiuj konstruaĵoj restas, sed oni trovas epigrafojn kaj skulptaĵojn faritajn tiam diversloke en la valo. Post la Liĉavioj venis la dinastio Malla, komence unuigita sed poste disfalonta en tri regnojn. Ankaŭ dum tiu tempo tre riĉaj kulturaĵoj estis kreitaj, multe el kiuj ankoraŭ ekzistas.
Poste venis la dinastio Ŝaha.
De ĝia bazo en Gorka (100 km nordokcidente de Katmanduo) ĝi etendis sian potencon ĝis la valo de Katmanduo, kaj poste unuigis la tutan teritorion de Nepalo. Nun Nepalo estas senreĝa lando.




## La valo de Katmanduo

Je alteco de ĉirkaŭ 1.300 metroj super la marnivelo, la valo de Katmanduo entenas la ĉefurbon kaj estas ankaŭ la komerca kaj kultura centro de Nepalo.
Ĝi kovras 360 km2 en formo de ovo ĉirkaŭita de verdaj montoj, mezurante 24 km orientalokcidente kaj 19 km nordalsude. Pasintece la valofundo estis kovrita de lago.
Laŭ legendo la bodisatvo Manĝuŝri venis de Ĉinio kaj tranĉis la sudan monton por lasi la akvon elflui. Poste li kreis la unuan loĝantaron.
La valo havas grandan nombron da etnoj, el kiuj la nevaranoj estas la elstara. Tiuj establis la dinastion Malla kaj kreis ties imponajn artaĵojn.
La urbo Katmanduo dekomence estis fando-poto, kaj tio klarigas ĝian riĉan kulturon. Ĝi havas unikan urboplanon – kvartalojn centritajn sur temploj kaj internaj kortoj. Ĉiam ĝi estis fonto de inspiro por multaj artistoj kaj skribistoj, kaj post la malfermiĝo de Nepalo en 1950 ankaŭ por multaj homoj el la tuta mondo.



## Nagarkot~Dulikhel

Nagarkot estas fama turista vizitejo en Nepalo.
Ĝi situas 32 kilometrojn oriente de Katmanduo je altitude de 2.175 metrojn super la marnivelo.
Panoramo de la ĉefaj orientaj pintoj de la Himalajo inkluzive Sagarmaton (Everesto) videblas de tie ĉi.




Nagarkot estas fama ankaŭ pro sunoleviĝo de malantaŭ la montaro kaj aliaj belaj naturaĵoj. Nur oni devas havi iom da bonŝanco: Oni diras, ke la Himalajo estas tiel ofte videbla en Nagarkot kiel tigrojn en Ĉitŭan.



**Ĉitaŭan Nacia Parko**

Ĉitŭan Nacia Parko estas la plej fama ircelo en Nepalo por turistoj kiu volas ĝui ĝangalan naturon.
Ĝi estis deklarita nacia parko en 1973, kaj en 1984, de UNESCO, monda naturheredaĵo. La parko ofertas protekton al 50 specioj da mamuloj inkluzive unukornaj rinoceroj, bengalaj tigroj, leopardoj, bradipoj, sovaĝaj elefantoj, striitaj hienojn delfenoj.kaj arbarbubaloj.En la parko videblas almenaŭ 526 specioj da birdoj, 126 specioj da fiŝoj, 150 specioj da papilioj kaj 49 specioj da reptilioj ...
Aktuala studo montras ke triono de la nepalaj tigroj estas en Ĉitŭan.
La parko sterniĝas sur 332 km2 en la mezesuda parto de la lando.
La arbaro konsistas precipe el sal arboj, altaj arbedaj terenoj, malaltaj montoj, arkforma lagoj kaj sezone inunditaj ebenaĵoj.



**Pokhara**

Kviete ripozante ĉe la piedo de la majesta Annapurna Himalajo, la valo de Pokhara staras je 827 metroj super la marnivelo.
La samnoma ĉefa urbo de la trankvila valo estas ĉarma ekirejo por pluraj famaj piedvagadvojoj.
La vidinda Pheva lago kaj la grandioza fiŝvosta pinto de Maĉapuĉre leviĝanta malantaŭ ĝi kreas etoson de paco kaj magio.
La ĉirkaŭaĵoj inkluzivas densajn arbarojn, sovaĝajn riverojn, klarajn lagojn kaj mondfamajn panoramojn de Himalajo. Se Katmanduo estas la kultura centro de Nepalo, Pokhara estas ĝia aventura centro.
De ĝi komenciĝas la klasikaj piedvojoj al Ĝomsom kaj la trisemajna Annapurna rondiro. Por nepiedvagantoj la valo ofertas montarajn vidindaĵojn kaj ekvidojn de la kampara nepala vivo. La turista centro ĉe la lagobordo etendiĝas ĝis la sudorienta limo de la valo. Tie oni povas ĝui la sunon, manĝojn, muzikon kaj aliajn distraĵojn. La vidindaĵoj de Pokhara valo: la montara fono, Pheva lago, Seti Gandaki rivero, Mahendra kaverno, muzeoj, ktp...


***« La vivdinda Pheva lago kaj la grandioza fiŝvosta pinto de Maĉapuĉare leviĝanta malantaŭ ĝi kreas etoson de paco kaj magio »***



**Laŭtaga programo**

· 26a de februaro: Alveno kaj enhoteliĝo

· 27a de februaro: Matena vizito al Baŭdhnath kaj Pasupathinath, post tagmanĝo AMO Seminario



· 28a de februaro: Matena vizito al Svajambhunath kaj post tagmanĝo AMO Seminario

· 29a de februaro: Matenaferma programo de AMO kaj post tagmanĝo vizito al Bhaktpur, kaj post tagmeze rekte vojaĝi al Nagarkot kaj tranokti tie

· 1a de marto: matena rigardado de montaroj kaj poste vojaĝi al Dulikhel( tiuj kiuj povas marŝi povas iri piede sed tiuj kiuj ne povas, per buso), Tranokto en Dulikhel.

· 2a de Marto: Matena vizito al Nomobuddha kaj forlaso de Dhulikhel por Ĉitŭan Nacia Parko, trankoto en la parko

· 3a de marto: Observado de birdoj antaŭ matenmanĝo. Kanota veturado kaj promenado antaŭ la tagmanĝo; elefantrajdo kaj ĝangala promenado posttagmeze

· 4a de marto: Ekveturo al Pokhara kaj boatado sur Phewa lago, trankoto en Pokhara

· 5a de marto:Je la 6a horo matene ekveturo al Sarangkot por rigardi Annapurna kaj aliajn montojn; posttagmeze ekskurso al diversaj lokoj

· 6a de marto :Matena ekskurso kaj post la tagmanĝo diversaj esperantaj programoj

· 7a de marto: Reveno al Katmanduo frue matene kaj ripozo

· 8a de marto: Libera tago kaj adiaŭa vespero

· 9a de marto: Foriro

Kotizo (por unu persono): 850 eŭroj por 12-taga ekskurso, restado en bonkvalita hotelo, tri manĝoj ĉiutage, enirpagoj en diversaj lokoj kaj transportado
La menciita kotizo validas por dulita ĉambro. Se vi deziras unulitan ĉambron (por la tuta periodo), bv aldoni 300 eŭrojn al la menciita sumo. La kotizo inkluzivas manĝojn kaj loĝadon dum la tuta programperiodo. La programeroj ŝangeblas pro neatenditaj kialoj.

Pli da informoj ĉe Bharat: nespa.1990@gmail.com



# Chuck Smith pri la Duolinga Esperanto-kurso ĉe Muzaiko



*Chuck Smith estas Usonano kiu eklernis Esperanton en 2001. Samjare, li fundis «Vikipedio»-n, la E-version de Wikipedio. Lastmaje, post 9 monatoj de teamlaboro, li lanĉis novan kurson de Esperanto ĉe Duolingo, tre fama lingvolernilo perrete.*
*Dank'al Radio Muzaiko (reta radio), ni proponas al vi sekvi kelkajn momentojn de intervjuo kun Chuck, plene aŭskutebla kaj legebla ĉi-tie .*

Muzaiko

***Muzaiko***: Saluton karaj aŭskultantoj de Muzaiko. Nun antaŭ la mikrofono de Muzaiko troviĝas Chuck Smith. Saluton Chuck!
**Chuck Smith**: Saluton!

***M:*** Do, Chuck, vi estas unu el la ĉefmotoroj aŭ la ĉefmotoro de la kurso, kiu kreiĝis ĉe Duolingo. Do tiam mi ŝatus demandi vin: do kio estas tiu kurso? Kio estas Duolingo?

***CS:*** Do, Duolingo estas retejo en kiu oni povas lerni lingvojn senpage. Kaj ni kreas kurson de Esperanto el la Angla.
(...)
Do, ni estas teamo de ok homoj, kaj mi ĝojas ke ni havas sufiĉe diversan grupon. Do, inter junuloj kaj ne tiom junuloj, homoj de Eŭropo kaj Nordameriko, kaj ankaŭ virinoj kaj viroj. Kaj, do, nia teamo konsistas el Ruth Kevess-Cohen el Vaŝingtono ; Ed Robertson el Skotlando ; Judith Meyer el Germanio ; Anja Eisemann, germanino en Francio ; Jeremy Aldrich en Virginio, Usono ; Sean Munderloh, ankaŭ en Usono ; kaj laste kiel konsilanto Anna Lowenstein.

***M:*** Kaj vi forgesis unu personon, vin!
(...)
Vi diris ke la kurso estas de la Angla al Esperanto, sed en la grupo ankaŭ vi havas homojn, kies denaska lingvo ne estas la Angla. Do, kial vi kreis nur de la Angla al Esperanto? Kial ne de aliaj lingvoj?

***CS:*** Ĉar tiu decido estas fakte de la flanko de Duolingo, ke ili decidas sin por ĉiuj kursoj, kiujn lingvo-parojn ili havas. Kaj ili fakte ankaŭ volas, ke post kiam nia kurso maturiĝas, ni povu ankaŭ havi kursojn el aliaj lingvoj al Esperanto.

***M:*** (...) Nun mi ŝatus ankaŭ demandi kiel eblas vin helpi rilate al la laboro.

***CS:*** Do, ni havas grupon en Fejsbuk (Facebook), nomata "*Laborgrupo pri Esperanto kaj Duolingo*" aŭ io tia. Kaj vi povas veni tien kaj kiam ni havas iun taskon aŭ iun manieron helpi, ni tie petos. Krome vi povas iri al la oficiala forumo de Duolingo pri Esperanto, kaj tie, se iu demandas pri Esperanto, vi povas respondi. Kaj ankaŭ ni havas fakte por ĉiu frazo en la tuta kurso de Duolingo, ni havas kvazaŭ iun forumon de tiu -aŭ fakte, fadenon-.



Kaj tie vi povas respondi al la demandoj de komencantoj pri tiu frazo.

***M:*** Kaj se iu ŝatus helpi vin pli pri krei kurson por Esperanto kaj aliaj lingvoj, ĉu eblas tion fari?

***CS:*** Jes, fakte vi povas aliĝi al la retejo Duolingo.com/apply kaj tie vi povas skribi en Esperanto kaj en via denaska lingvo, kial vi estas taŭga por helpi pri tiu lingvo-paro pri kurso. Kaj poste, laŭ la postuloj de la komunumo, kaj laŭ la taŭgeco de la kandidatoj, Duolingo decidos kiujn lingvo-paroj ili venonte volas. Do, se vi volas ke via lingvo iĝu la venonta kurso de Duolingo, bonvolu kandidatiĝi.



***M:*** Bone! Dankon! Do, ĉu vi povas ripeti, kie oni povas kandidatiĝi ekzakte? Por ke oni certe memoru ĝin.

***CS:*** Oni povas iri al **Duolingo.com/apply**

***M:*** (...) Kiom da homoj lernas Esperanton ĉiutage pli malpli per Duolingo?

***CS:*** Do, entute estas pli ol sesdek mil lernantoj *(NdlR: Septembre estis pli ol 133.000 lernantoj de Eo ĉe Duolingo)*, kaj ne eblas scii vere kiom da homoj lernas ĉiutage, sed estas sufiĉe multe fakte, kaj ni daŭre legas raportojn de homoj kiuj finas la kurson, kiuj estas tre brilaj...

(...)

***M:*** Kaj kion vi spertis? Ĉu la ĉeesto de Esperanto en Duolingo estas utila por aliaj aferoj, aŭ estas nur utila por ke Duolingo lernantoj povas ankaŭ vidi ke Esperanto ekzistas?

***CS:*** Fakte estas nekredeble tiurilate, ĉar ekzemple aperis longega artikolo en "*The Verge*", iu granda usona novaĵretejo, kaj tiu donis multe da atento al Esperanto. Kaj krome, aperis intervjuo en NPR "*Nacia Publika Radio*" en Usono, kaj ankaŭ krome, kelkaj lingvaj firmaoj kreis kurson de Esperanto pro... laŭ mi, mi pensas ke estas pro Duolingo, sed oni ne povas rekte vidi.

***M:*** (...) Viaj lernantoj, kion ili diras rilate al la kurso de Esperanto?

***CS:*** Do, iusence ĉiuj kursoj de Duolingo havas strangajn frazojn, sed tio estas ankaŭ kvazaŭ la naturo de Duolingo, sed fakte multaj diras ke **la frazoj en Esperanto estas fakte la plej interesaj aŭ kreemaj frazoj en ajna kurso,** kaj mi pensas ke estas ĝuste pro tio, ke preskaŭ ĉiuj en nia teamo estas denaskaj Anglalingvanoj malkiel aliaj kursoj por -kompreneble- kialoj. Kaj pro tio, oni povas meti amuzajn aferojn, kaj de la Esperanto kulturo, kaj -ekzemple- de Usonaj filmoj, kaj tiel plu. Kaj tiel homoj multe amuziĝas.

***M:*** Okej! Koran dankon pro via laboro kaj pro la laboro de la tuta teamo. Kaj mi scias ke jam kelkaj homoj venas al **IJK** *(Ndlr: paĝo18)* pro lerni Esperanton ĉe Duolingo. Mi tre ĝuas pro tia evoluo, dankon!

***CS:*** Do, nedankinde, kaj multajn dankojn pro via laboro!

Transskribite de Vanege EO por Muzaiko

# La Kasteleto de nenie - 1a parto

Novelo verkita de Miŝel Laitat

La du fratoj veturis jam de longe sen plu vidi nek vilaĝon, nek homon, eĉ nek irejon. Kvin horojn antaŭe, Ĝiorĝio trovis ŝparvojon sur la mapo. Tra tiu vojo li esperis ŝpari almenaŭ du horojn. Malbona ideo, ĉar tri horojn poste la vojo ŝanĝiĝis en padon kaj post plia horo la pado tute malaperis.

La pejzaĝo pli kaj pli similis al savano. La disaj arboj miksiĝis kun altaj herboj. Sed ĉe la okcidento, la suno subiris. Antaŭ nelonge venos la noktiĝo.

- Ĉu vi certas ke tio estas la ĝusta direkto ? demandis Mateo,  klopodante ĉirkaŭiri la truojn kaj stumpojn.
- Jes ja, mi certas, respondis Ĝiorĝio.
- Kiel vi scias?
- Mi sentas ĝin.
- En tiu okazo ni certe dormos sub la steloj kaj manĝos image.
- Restu optimista.
- Optimista. Ni preskaŭ ne plu havas benzinon.
- Restu optimista. Ni ankoraŭ havas du benzinkruĉojn en la kofrujo.
- Mi ne plu povas fidi vin, Ĝiorĝio. Vi estas fama muzikkomponisto sed vi ne scias legi mapon.
- Kaj vi estas fama matematikisto, sed vi ne kapablas ĝui la nunan momenton. Rigardu ĉirkaŭ nin. Ĉu vi iam vidis tian belan naturan spektaklon?

Ne, Mateo neniam vidis tian belan naturan spektaklon kaj tute ne interesiĝis pri la naturo, la arto kaj ĉiuj tiaj aferoj kiujn li kvalifikas supraĵaj. Li daŭrigis sian vojon sen respondi, kaj pasis laŭlonge de arbareto. Subite, li ostoskue haltis. Maldekstre li ĵus ekvidis longan kaj malnovan muron. Kaj ne tre malproksime estis duobla kradpordego. Kiu diable povas konstrui muron ĉi tie en la mezo de nenie ?  sin demandis la du fratoj. Mateo ĝisveturis la kradojn kaj haltigis la aŭton.



Ili ambaŭ elveturiliĝis kaj rigardis tra la kradajn aperturojn de la pordego. Kelkaj arboj kaŝis la elvidon, sed ili povis facile imagi ke la bieno estis tre granda kaj tre bontenata. Kiu povis esti sufiĉe freneza por vivi ĉi tie, je kilometroj for de ĉia civilizacio? Nur enirinte en la bienon, ili povos malkovri tiun originalulon. Des pli ke vojerarinte, ili devis trovi lokon por dormi kaj certe por manĝi. Sen plu atendi, ili devis agi. Mateo prenis la kradon kaj tiris, puŝis, skuis kaj tiris denove. La krado ne moviĝis eĉ je unu milimetro.

- Tiu pordego delonge ne plu servas, ĝi estas tute blokita, li diris.

Ĝiorĝio alproksimiĝis la pordon, malforte puŝis ĝin kaj senpene malfermis ĝin. Malfeliĉe la krado definitive blokiĝis post kvindek centimetroj. Sufiĉe por piede enŝteliĝi sed ne veturile. La domo verŝajne ne estis tre for, ili certis. Ili povis paŝi kaj lasi la veturilon kie ĝi staris. Ĝi certe ne estos ŝtelita tie.

La du fratoj do trapasis la pordon kaj poste la arbareton kiu kaŝis la bienon. Subite, ili ambaŭ haltis. Antaŭ ili estis grandega belega bieno. Grandaj gazonoj, vastejoj kun statuoj, belaj floroj, bosketoj kaj eĉ lageto. Kaj en la mezo staris belega kasteleto.

Tre mirigite, ili ambaŭ trapasis la gazonon ĝis la domo.

- Ĉu vi nenion rimarkas, demandis Ĝiorĝio ?
- Jes ja, mi rimarkas ke ili devas havi armeon da ĝardenistoj por bonteni tian parkon.
- Sendube jes, sed mi ne parolis pri la parko. Ĉu vi ne aŭdis ion?
- Ne, respondis Mateo. Nenion. Kion ?



- Ĝuste tio estas la mistero. Ni aŭdas nek la venton nek la birdojn. La silento estas plena.
- Bona afero. La birdoj tute ne interesas min. Mi lacas kaj mi malsatas, respondis Mateo iom nervozigita.

Li alproksimiĝis la doman pordon, sonorigis kaj atendis. Neniu respondis. Li sonorigis denove du-, tri-, kvar-foje kaj pli kaj pli nervoziĝis. Neniu respondis. Li prenis la pordan anson kaj tiris, puŝis, skuis kaj tiris ankoraŭ. La pordo restis fermita. Ĝiorĝio alproksimiĝis, baskulis la anson kaj senpene malfermis la pordon.

- Mi malŝategas tiun lokon kun ĉiuj tiuj stultaj pordoj, diris Mateo enirinte la kasteleton.

Sed ili tuj haltis kiam ili malkovris la internon. Tiu ĉambro estis plene da muzikiloj : koncertpianoj, violonoj, violonĉeloj, kontrabasoj, klarnetoj, koncertharpoj, gitaroj, flutoj, trumpetoj, klavicenoj, kaj ankoraŭ multe da aliaj, kaj eĉ granda orgeno ĉe la ekstremaĵo de la ĉambro.

Post la konsterniĝo, Ĝiorĝio ĵus reekregis sin kaj tuj sidiĝis antaŭ la piano kaj ludis kelkajn notojn de propra komponaĵo.

- Tiu piano estas perfekte agordita, diras li al sia frato.



Li ne atendis la respondon kaj prenis violonon kaj ekludis.

- Iu freŝdate agordis tiujn muzikilojn, li diris.
- Mi prifajfas tiujn muzikilojn, Ĝiorĝio, mi malsatas, mi lacas, mi volas trovi la kastelmastron.

Kaj li tuj forte kriis.

- Ĉu iu estas ĉi tie ? Uhu ? Uhu ? Ĉu iu aŭdas min ? Ni estas du vojerarintaj vojaĝantoj. Uhu! Du malsategaj vojaĝantoj !

Neniu respondis.

- Bone, mi iros sole trovi la kuirejon, li diris, elirante la muzikĉambron.

Elrevigite, Ĝiorĝio sekvis sian fraton tra la koridorojn. Paŝante, li rimarkis la multnombrajn alkroĉitajn pentraĵojn sur la muroj. Ili estis tiom multaj ke oni preskaŭ ne plu povis vidi la muron. La temo estis preskaŭ ĉiam la sama. Virino, viro aŭ infano vestita per epokaj vestaĵoj staris antaŭ sia domo.

- Ĉu vi vidis tiujn pentraĵojn, Mateo ?
- Ŝmiraĵoj, ŝmiraĵoj, ankoraŭ ŝmiraĵoj, sed ne nutros min, respondis Mateo plu alvokante. Uhu ! Ĉu iu aŭdas min ? Ĉu iu estas en tiu domaĉo ?
- Eble ili ne loĝas ĉi tie.
- Kaj kie ili loĝas ? Ni eĉ ne vidis unu domon dum kvin horoj de vojaĝo.
- Eble estas vilaĝo ne for en la alia direkto.
- Eble, respondis Mateo antaŭ ol denove krii. Uhu ! Ĉu iu aŭdas min ? Ĉu iu estas en tiu kastelaĉo ?



Pliafoje neniu respondis. Sed ili ne povis vidi ke, samtempe, ekstere, centoj da diverskoloraj birdoj alvenis de ĉie kaj silente surtegmentiĝis.

Dum tiu tempo, interne, la du fratoj trairis koridorojn, supreniris ŝtuparojn, malsupreniris aliajn, trairis pliajn koridorojn kaj ankoraŭ trairis malsuprenajn ŝtuparojn. Finfine ili trovis kuirejon.

- Ĉu vi vidis, Mateo, iu primetis la tablon por du gastoj.
- Kaj en la fridujo estas du sandviĉoj kaj du bieroj, respondis li.

- Stranga afero.
- Kial stranga afero ? Ni prenu ilin kaj serĉu nun dormĉambron por tranokti.



Mateo ne atendis la respondon de sia frato kaj foriris kun la sandviĉoj kaj la bieroj. Ili supreniris la ŝtuparon kaj malfermis la unuan pordon kiun li trovis. Ekaperis bela granda dormoĉambro kun du litoj. La du fratoj eniris.

- Ĉu vi vidis ? demandis Ĝiorĝio, neniu pentraĵo sur la muroj en tiu ĉambro.
- Bona afero. Mi malŝatas ĉiujn naivajn malbelajn pentraĵaĉojn.
- Ankoraŭfoje du litoj estas pretaj. Same kiel pri la teleroj sur la tablo kaj la du sandviĉoj kaj ankoraŭ la du bieroj.
- Ne Ĝiorĝio, ne rekomencu kun viaj fantaziaĵoj. Ĉio estas normala ĉi tie. Punkto.
- Ĉu vi trovas tiun kasteleton normala, kara frato ? Vere ? Ĉi tie, en la mezo de nenie, ĉirkaŭita de bontenegita ĝardeno, plena de muzikiloj kaj de miloj da pentraĵoj.
- Sen polvo ! Kiel se miloj da dompurigistoj laborus tagnokte ! Kaj tamen sen iu ajn ie ajn. Sen homoj nek bestoj ĝis kilometrojn ĉirkaŭe. Ĉu vi vere trovas tion normala?
- Mi ne volas scii pli, Ĝiorĝio. Mia tuja plano estas manĝi, drinki, dormi. Punkto. Kaj morgaŭ matene, foriri.
- Sed …
- Ne ! Manĝu, drinku, dormu kaj silentu.

Ĝiorĝio do eksilentis. Li tre bone sciis ke kiam lia frato nervoziĝas, ne utilas daŭrigi. Li do silente manĝis la sandviĉon, trinkis la bieron kaj enlitiĝis. Li tuj endormiĝis.



Kontraŭe, Mateo malfacile endormiĝis. Fakte la domo ja ektimigis lin. Ĝiorĝio pravis, tiu kasteleto estas nenormala. Tute nenormala.

Kaj ne jam li konsciis kiagrade.

Mateo finfine trovis Morfeon. Samtempe la suno malaperis kaj la silenta nokto envolvis la kasteleton. La nokto pasis malrapide preskaŭ sen bruo. Sed ekstere la fontanoj rekomencis flui kaj la vento ekrevenis malforte skui la arbojn. Kvazaŭ por veki la naturon el tre longa dormado. Sur la tegmento, daŭre silentaj, la birdoj estis pli kaj pli multaj.

***(Daŭrigota …)***



Jen la poezia traduko de la fablo far **S. G. Rublov**:

# Lupo kaj ŝafido

Malpravas senfortul' konstante en la mond': La historio ja ekzemplojn multajn donas. Sed historion mi ne verkas, nek komponas, kaj jen pri la afer' de fablo vers-rakont'.

Ŝafid' en varma tag' al rivereto venis,
Sed en la sama lok' malsata Lup' sin trenis.
Manĝaĵon serĉis li kun sanga avidec'.
Veninte al viktim' indignon li mienis,
Kun la aspekt' de just' kaj leĝa dec';

"Ĉu rajtas vi, fripon', per la muzel' malpura
Trinkaĵon mian leki en river'
Kun senmoder'
Kaj malpurigi ĝin per ago aventura?
Pro tia malhonesta rab', vi restos sen la kap'!"

"Se Granda Lupa moŝt' permesos,
Mi diros en humil', ke trinkas mi kun paco "

De lia moŝta lok' je granda interspaco,
Kaj vane li insultas kaj ekscesas:

Ne povas kauzi mi malbonon nun por li."

"Do, primensogas mi!
Kanajlo, sentaŭgul'! jen kia aĉa faro!
Memoras mi, ke en pasinta jaro
Arogis vi tutsame sen ĝentil':

Mi ne forgesos tion kun facil'!"

"Pardonu, tamen mi eĉ tiam ne ekzistis."

"Do estis via frat', al vi similas li."

"Ne havas fratojn mi."

— "El via famili',
Ja estis iu ajn", Indigne li insistis:

"Ja tuta via gent', paŝtistoj kaj hundar'
En la koler' al mi sendube tre similas
Kaj ofte lau eblec' malice malutilas.
Al vi nun estas venĝ' por tuta aĉa far."

"Ĉu kulpas tion mi? "

— "Silentu!»

Lupo diras:

"Min tedis la diskut', laciĝis jam orel'.
Plenkulpa estas vi, ĉar manĝi mi deziras."

Kaj Ŝafon trenis for la Lupo en kruel'.



*NdlR: Ni elkore dankas Tatjana Auderskaja, pro la sendo de ĉi-tiu alia versio.*

www.horizonto.net

# Vojaĝo per bicliklo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'





## Nepalo

2/10 -> 30/10/2009 - 413 km (10487 km)




▷ La pako alvenas je la nordo! Kaj por kolekti ĝin, nia amiko, kiu ne povas iri tiom for, al la fakturo devas aldoni 130 eŭrojn pro kostoj de gardo, endogana transporto al Orly kaj eldoganiĝo. Do, entute pli ol 190 eŭrojn por pako je 12 kg!

Plie, ricevi pakon el Nepalo estas neeviteble suspektinde. Nia amiko estas du-dek-minutojn pridemandata de la doganistoj, kiuj tamen malkonsentos malfermi la pakon. Nur provu kompreni!...






Por malstreĉiĝi, dum ni atendas la flugon al Tajlando, ni donacas al ni turisman ekskurson du-tagan en la ĝangalo de la nacia parko Chitwan por observi sovaĝajn bestojn. Kiel ĝangalon ni fakte trovas arbaron similan al iuj francaj, la gvidistoj estas dungitoj de la hotelo sed ne gardistoj de la nacia parko kaj la tigroj kaj rinoceroj siestas meze de la altegaj herboj, kies tranĉado komenĉiĝos nur la venontan semajnon. Sovaĝajn bestojn ni ne vidas pli da dum fota ekskurso per Ĵipo, ne inkluzivita en la prezo, komprenebl e.

Ni opinias, ke niaj gvidantoj tamen certe havas anstataŭan planon por ke ni povu vidi sovaĝajn bestojn. Kaj ili ja havas, ili kondukas nin al eta zoo!, ne inkluzivita en la prezo, kompreneble. Nur unu bona afero, la promeno sur dorso de elefanto kaj, precipe, la naĝado ĉe ili dum ilia ĉiutaga baniĝo, ne inkluzivita en la prezo, kompreneble.

Ĉion konsidere, malgraŭ la afableco de niaj du gastigintoj, tiu lando ĝisfine lacigis nin.

*(daŭrigota)*



# La 100-a Universala Kongreso de Esperanto
# Lillo, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2015



Cent dek jaroj pasis de post la unua Universala Kongreso okazinta en Bulonjo-ĉe-Maro.
Ĉi-foje oni elektis kiel kongresurbon Lillo en nord-orienta parto de Francio. La kongreso okazis en moderna konstruaĵo *Lille Grand Palais*.
Al ĝi enskribiĝis 2689 personoj el 81 landoj de kvin kontinentoj: rekorda nombro da partoprenantoj de UK-oj okazintaj en la 21a jarcento. Informoj pri la evento estis bone disvastigitaj.
En la urbo aperis multaj afiŝoj pri la aranĝo kaj pri la publika programo, kiu okazis ĉiutage posttagmeze sur la placo de la Teatro. Prezentiĝis diversaj muzikgrupoj inter kiuj ne mankis JoMo, La Kompanoj, Kapriol, Kajto.

La temo de la kongreso estis: "***Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj***".
La programo estis varia kaj riĉa kun interesaj prelegoj, diskutoj, debatoj, E-kursoj kaj lingvokursoj, KER-ekzamenoj, filmoj, teatraĵoj, koncertoj, ekspozicioj, spektakloj kaj muzikaj prezentoj. Ĝi montris ampleksan kulturon kreitan de esperantistaro.
Libroservo prezentis abundan kaj varian stokon da libroj, T-ĉemizojn kaj aliajn esperantaĵojn.
Okazis multnombraj eroj kaj aktivaĵoj. Kunvenis akademianoj, medicinistoj, fervojistoj, ateistoj, spiritistoj, bahaanoj, komunistoj, juristoj, blinduloj, skoltoj, vegetaranoj, komercistoj, matematikistoj, radioamatoroj, nefumantoj, kat-amantoj, SAT-anoj, legantoj de la revuo "Esperanto".
Plurfoje estis pritraktita la kongresa temo, okazis IKU-prelegoj kaj serio da prelegoj pri Francio, vinseminario, oratora konkurso. Formiĝis internacia koruso sub gvido de Alan Bishop el Aŭstralio.

La poresperanta programo komenciĝis per Movada Foiro. Ĝi estas unu el la plej ŝatataj aranĝoj dum la UK-oj.
Tie sur 120 tabletoj diversaj asocioj prezentis allogan E-materialon kaj informis pri sia agado. Ĝi estas granda renkontiĝejo kun malnovaj kaj novaj amikoj.

Dimanĉe okazis la Solena malfermo de la kongreso. Unuafoje en la historio de la Universalaj Kongresoj ĝi estis rekte elsendita per interreto.
Esperantistoj el pluraj partoj de la mondo povis sekvi ĝin. Kortuŝa estis la salutparolado de **Louis Christoph Zaleski-Zamenhof**, la nepo de la Majstro.





La solenaĵon ĉeestis kaj alparolis la publikon ankaŭ la alta protektanto de la 100-a UK, la urbestro de Bulonjo-ĉe-Maro s-ro **Fréderic Cuvillier**.

La kongresa kuriero *Belfrido* ĉiutage informis pri novaĵoj, ŝanĝoj kaj aldonis liston de novaj kongresantoj. Ankaŭ la loka gazeto *La Voix du Nord* (La Norda Voĉo) ĉiutage informis pri kongresaj eventoj. Ne mankis intervjuoj kaj televid-elsendoj.



**Veronika Poór** estis elektita Ĝenerala Direktoro de UEA.
Indonezio estis akceptita kiel nova Landa Asocio. Dekdu esperantistoj ricevis diplomon pri elstara agado kaj pri elstara arta agado.
Okazis belartaj konkursoj kaj la tradicia aŭkcio, unu el la viglaj kaj ŝatataj programeroj (spektaklo), kiun majstre gvidas jam de kelkaj jaroj Humphrey Tonkin.
Koreoj invitis kongresi en la jaro 2017 en Seulo, slovakoj - venontjare en Nitro. Junuloj havis abundajn kaj buntajn programerojn kaj amike amuziĝis. Infanoj ĝuis sian kongreseton.
Same kiel lastjare ankaŭ ĉi-foje okazis futbalmatĉo. Nia teamo konsistanta el entuziasmuloj tamen perdis 4-0 kontraŭ skipo de *Okcidenta Saharo*.

La kongresanoj havis eblon partopreni en diversaj ekskursoj biciklaj kaj busaj al Parizo, Amieno, Arraso, Bruĝo kaj al aliaj lokoj.
La plej alloga estis tiu al Bulonjo-ĉe-Maro. Tie oni vizitis la teatron Monsigny, kie okazis la 1-a Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 1905. La prezidanto de UEA Mark Fettes citis la tiaman paroladon de Ludoviko Zamenhof.
Centoj da esperantistoj paradis tra la stratoj kun afiŝoj kaj flagoj al la monumento de Zamenhof antaŭ la stacidomo kaj poste al la urbodoma akcepto.
Tie post la paroladoj la esperantistaro estis regalita per vino, biero, diversaj sukoj kaj manĝaĵetoj.



Vespere Guillaume (Guijom') Armide, la franca talenta muzikartisto preleg-koncertis en la bulonja teatro por la ĝenerala publiko, sed bedaŭrinde venis tre malmultaj personoj.

La 1-a de aŭgusto la jubilea 100-a Universala Kongreso de Esperanto finiĝis. Dum la tuta semajno akompanis nin la giganto Zamenhof.
Oni resumis la semajnan aranĝon, disdonis diplomojn pro la kvadekjara kaj kvindekjara membreco al UEA.
Antaŭ la fino prezentiĝis sur la podio infanoj el Infana Kongreseto kaj kantis por la publiko.
Gijom' Armide pianludis. Al Ĝenerala Direktoro Osmo Buler estis transdonitaj donacoj pro lia venontjara emeritiĝo.
Clay Magalhäes dankis kaj disdonis rozojn al ĉiuj LKK-anoj kaj al la helpantoj. Post la transdono de la verda standardo al la reprezentantoj de la LKK en Slovakio Petro Baláž kaj la urbestro de Nitro sincere invitis la ĉeestantaron al la 101-a UK, okazonta tie venontjare. Laste kaj neatendite por ĉiuj Petro Baláž petis edziĝon al sia pola koramikino Dorotka Rodzianko antaŭ kelkcentoj da spektantoj kaj donacis al ŝi fianĉringon.
Fine estis kantata la Esperanto-himno *La Espero*.

*Liba Gabalda*












**ÉVÉNEMENT**
**Mondial d'espéranto.** Jusqu'à demain. Un programme composé de cours express, d'expositions, de concerts, d'animations musicales...
Aujourd'hui :
– Atelier de chant en espéranto avec le duo Kajto. À 10 h, place du Théâtre, Lille. Gratuit.
– Match international de football (Espéranto/Sahara occidental). À 18 h, Stadium Lille métropole, avenue de la Châtellenie, Villeneuve-d'Ascq. Gratuit.












**KORAJN KONGRESAJN**
**SALUTOJN**











Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

# Ekologio – Totala milito kontraŭ la naturo




EN *Ĉio povas ŝanĝiĝi* [1] la kanada ĵurnalistino Naomi Klein donas sian ekkonsciiĝon pri la ligo inter kapitalismo kaj klimatŝanĝo.
La brutaleco de la ekspluatado de nafto kaj gaso en Kanado, kie ŝi loĝas, ŝajnas al ŝi kvazaŭ elemento de „ekologia ekstermado”, tiu ĉi totala milito kontraŭ la naturo.
La aŭtorino de *No logo* priskribas mondon kiu konsumegas fosiliajn energiojn rikoltitajn en ĉiam pli sensencaj kondiĉoj, en la momento, kiam ĉiuj klimataj signaloj lumas ruĝe.
Nun jam neniu estas ŝirmata kontraŭ la furiozo de la produktismo, kion atestas la kazo de la insulo Naŭro [alilingve : *Nauru*] en la suda Pacifiko, detruita de la ekspluatado de fosfatoj kaj alfrontita al la altiĝo de la marnivelo.
Klein priskribas la mobiliziĝojn, kiuj aperas eĉ en la plej foraj anguloj de Nordameriko, de Alasko ĝis Ontario, de la Misisipo-delto ĝis Vermonto, de Teksaso ĝis Kalifornio.

Ĉie, loĝantoj, kampkulturistoj kaj aktivuloj alfrontas la gigantajn -duktojn, blokas la instalaĵojn de skista frakturado kaj alĉenigas sin al profundakvaj maraj platformoj.
Tiuj agadoj kune estas la „blokadismo” [*„Blocadie”*], tiu granda elano por media justeco, kiu ebligas esperi, ke io ŝanĝiĝas.
Klein vidas en ĝi la fonton de novtipa rezistado, kiu ligas la kontraŭkapitalismajn batalojn kun la ekologiaj movadoj kaj la ribeloj de la indiĝenaj popoloj.
Ŝi alvokas enradikigi la kritikon al la sistemo en konscion pri la Tero kaj samtempe batali kontraŭ la trompoj de la apogantoj al „verda kresko” kaj aliaj filantropiaj „geoklikoj” : por ili temas pri *„regeneri !* kaj sanigi la patrinon Tero per *„eternigo de la vivo”* tamen sen malaltigi la ekologian spuron de la homaro, diras la aŭtorino kaj lasas la leganton iom nekontentigita ĉe la fino de tiu eseego.

La samaj entreprenoj, kiuj elprenas la mineralojn el la terkrusto, estas la unuaj profitantoj de la natur-merkato, laŭ Sandrine Feydel kaj Christophe Bonneuil, kies atentokapta enketo, *Predado* [2], rakontas la historion de la planedvasta ekonomia kaj banka akaparo de la vivantaj resursoj.
Bankoj kaj invest-fondusoj hodiaŭ aĉetas gigantajn naturajn zonojn riĉajn je animalaj kaj plantaj specioj en danĝero de ekstermiĝo.
Ĉar la kresko devas ne esti limigita per ia ajn limo, la kapitalismo donas la antaŭrangecon al la merkato por reguligi la medion.
La ekregado de la Unuiĝintaj Nacioj kaj de ĝiaj organizaĵoj fare de la multnaciaj konzernoj plej detruemaj por la ekologia sistemo perfektigas tiun sistemon, kun la konsento de iuj grandaj neregistaraj organizaĵoj (NRO).
Tiujn oni igas kontribui por taksi la valoron de la specioj.



La plej granda biobanko de la mondo, kiu havas koncesion de tridek kvar mil hektaroj en la ĝangalo de Borneo, en Malajzio, ekzemple volas meti prezon por la grandaj simioj por protekti ilin.
Baldaŭ la „multspeciaj korboj" ebligos etendi la merkaton de derivitaj produktoj.

La unua „verda borso" estis jam kreita en Brazilo kaj komencas la interŝanĝon de titoloj pri la amazonia praarbaro, kaj tiel laŭleĝigas la senarbarigon.
La tuta planedo fariĝas borse komercata varo.
La naturo estas subsistemo de la financsistemo, „kapitalo", kiu generas „fluon de servoj" taksatan de la notad-organizaĵoj.
Ekologiistoj kaj klimat-sciencistoj estas rekrutataj por orienti la „*cat bonds*", tiuj „katastrofaj obligacioj", kiuj aperas kiel la novaj produktoj de „ekologia blankigo" [3]

Ekde nun la financaj agantoj povas spekuli pri la malboniĝo de la ekologiaj sistemoj.
La verko finiĝas per fikcia scenaro situanta en 2029, jaro de borsa krizo, en kiu la tuno da karbo falis de 100 al 3 dolaroj.

La investistoj tiam uzas la naturan „kapitalon" por rehavigi al si kontantan monon.

Ĉar teni la karbonon kaptita en formo de arboj ne estas plu profitiga, ekologiaj bankoj kaj „verdaj" multnaciaj konzernoj tiam liveras la arbarojn al la motorsegiloj ...

**Agnès SINAÏ**




https://eo.mondediplo.com/article2275.html

[1] Naomi Klein : *Tout peut changer : Capitalisme et changement climatique*, Actes Sud-Lux, Arles-Monttréal, 2015, 640 paĝoj, 24,80 eŭroj.

[2] Sandrine Feydel et Christophe Bonneuil : *Prédation. Nautre, le nouvel eldorado de la finance [S.F. kaj Ch.B. : Predado. Naturo, la nova eldorado de la financo], La Découverte, Parizo, 2015, 216 paĝoj, 16,50 eŭroj.*

*[3] Vd Razmig Keucheyan, „Quand la finance branche sur la nature" [R.K. : „Kiam la financo ligas sin kun la naturo"], Le Monde diplomatique, marto 2014.*







# IJK 2015

Tuj post UK, la 71a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazis en la urbo Wiesbaden, Germanio. La kongreso estis sendube kvalita kaj sukcesplena dank al la kvalito de la organizado





Esperantistoj en junularaj kongresoj ofte ŝatas muzikon kaj dancadon. La organizantoj planis du koncertojn ĉiu-vespere : unu el miaj plej-ŝatataj estis la koncerto de Ŝanĝo (ĉi-supre). Ankaŭ ne-oficialaj koncertoj de tre bonkvalitaj muzikistoj pretervole okazis, kiel la Meditada koncerto de Gijom (dekstre). Kelkaj eĉ proponis ukuleleo-kurso !







La vetero estis absolute mirinda kaj perfekta por sportoj kaj eksteraj ludoj ! La tabloteniso, flugpilkejo kaj korbopilkejo estis el la plej kongruaj renkontiĝlokoj… kaj ne nur por infanoj kaj adoleskuloj !








*Artistoj en Esperantio kvalitas kaj ne nur pri muziko. Maldekstra kaj supra bildo montras unu el la pupoj de Anna, kreitaj laŭ la fabela imagaro.*



*La antaŭlasta vespero estis iom speciala : esperantistoj alvenis al kulinarfestivalo kun propraj manĝospecialaĵoj de sia lando. En ĉiuj budoj, la homoj povis gustumi ĉiu-monda manĝaĵo. Certe tre agrabla maniero montri la internacian etoson de esperantio !*


Venu
partopreni nian Zam'-
Feston, Sabaton la 12-an de
Decembro de la 12a ĝis la 18a ĉe
« De Pianofabriek », rue du Fortstraat, 35
1060 Bruselo !
Speciala invitito: Gaetano por
kelkaj Eo-kanzonoj !!!
estas
tago
de
Esperanto